Holocaust Remembrance Day 2020

On January 27, 1945, the extermination camp at Auschwitz was liberated. Holocaust Remembrance Day, observed each year by the United Nations, marks that occasion. By the end of 1945 the war in Europe was over, the United Nations was founded, and an era of relative peace began. Seventy-five years have passed since then.

Holocaust Remembrance Day is a day of mourning for the millions whose lives were taken from them, and a day of celebration of those brave individuals who saved the lives of those who would otherwise have perished. Over six million Jews and hundreds of thousands of Roma were murdered in a few short years.

One of the survivors of the Holocaust was Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof. His grandfather was the founder of the International Language Esperanto, Dr. L.L. Zamenhof (1859-1917), born of a Jewish family in Bialystok, in what later became Poland. Esperanto was created to promote peace and understanding among nations. So it comes as no surprise that in his book *Mein Kampf,* Adolf Hitler denounced Esperanto; nor is it surprising that the members of the Zamenhof family were specially marked for arrest when the Nazis entered Warsaw. Zamenhof's son Adam was shot; his daughters Zofia and Lidia were murdered in Treblinka, along with his sister Ida.

Of Dr. Zamenhof's direct descendants, only Adam's son, Ludwik, later Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, survived, escaping from the Warsaw Ghetto and assuming the fictional Christian pseudonym Krzysztof Zaleski – a name he never fully abandoned even after the war and his emigration to France. "If Zaleski saved Zamenhof," he said, "it would be wrong for Zamenhof to turn his back on him. So I combined my two names as Ludwik Krzysztof Zaleski-Zamenhof, because I felt myself to be both. The differences in that union are fundamental to the idea of tolerance – an idea that I made the guiding principle of my life." And Ludwik paid special tribute to Father Marceli Godlewski, of the Parish of All Saints in Grzybowski Square, who was among those who, at great personal risk, protected the Jews of Warsaw, Ludwik among them.

On October 9 of last year, Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof died, after a long life in which he worked for the spirit of tolerance and in which he remained faithful to the idea of peace and understanding that lies behind the language created by his grandfather and that is shared by the hundreds of thousands, indeed millions, of those who, like Zaleski-Zamenhof, speak Esperanto, the language of peace.

The Universal Esperanto Association mourns the recent passing of the grandson of the founder of Esperanto and remembers the thousands of Esperanto speakers, workers for peace, who died at the hands of the Nazis.

On this day, let us remember from the past and learn for the future: never again should people be persecuted for their religious, ethnic or cultural identity; all humankind should carefully respect the human right to freedom, including freedom of belief and language.

Ni neniam forgesu: May we never forget.

Tago de Holokaŭsta Memoro 2020

La 27-an de januaro 1945, la ekstermejo de Auschwitz estis liberigita. La Tago de Holokaŭsta Memoro, observata ĉiujare de Unuiĝintaj Nacioj, markas tiun okazon. Ĝis la fino de la jaro 1945, la milito en Eŭropo estis finita, Unuiĝintaj Nacioj estis fondita, kaj erao de relativa paco komenciĝis. Pasis depost tiam 75 jaroj.

La Tago de Holokaŭsta Memoro estas tago de funebrado de la milionoj da homoj kies vivoj estis forŝiritaj, kaj tago de agnoskado de tiuj kuraĝaj individuoj kiuj savis la vivojn de tiuj kiuj aliokaze estus pereintaj. Pli ol ses milionoj da judoj kaj centoj da miloj da ciganoj estis murditaj ene de nur kelkaj jaroj.

Inter la transvivantoj de la Holokaŭsto estis Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof. Lia avo estis la fondinto de la Internacia Lingvo Esperanto, d-ro L.L. Zamenhof (1859-1917). Li naskiĝis en juda familio en Bjalistoko, kiu poste fariĝis parto de Pollando. Esperanto estis kreita por antaŭenigi pacon kaj komprenon inter la nacioj. Sekve, ne estas surprize, ke en sia libro *Mein Kampf,* Adolf Hitler denuncis Esperanton; nek surprize, ke la anoj de la familio Zamenhof estis speciale identigita por arestiĝo kiam la Nazioj alvenis Varsovion. Adam, la filo de d-ro Zamenhof, estis mortpafita; la filinoj Zofia kaj Lidia estis murditaj en Treblinka, same la fratino Ida.

El la rektaj posteuloj de Zamenhof, nur la filo de Adamo, Ludoviko, poste Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, transvivis. Li eskapis el la Varsovia Getto kaj alprenis la fikcian kristanan nomon Krzysztof Zaleski – nomon kiun li ne plene forlasis eĉ post la milito kaj lia elmigro en Francion. “Se Zaleski savis Zamenhofon,” li diris, “ne decis, ke Zamenhof forturniĝu de li. Tial mi kunmetis ambaŭ nomojn kiel Ludwik Krzysztof Zaleski-Zamenhof, ĉar mi sentas min unu kaj la alia. La diferencoj en la unueco estas fundamento de la ideo de toleremo, kiun mi akceptis kiel la devizon de mia vivo.” Kaj Ludoviko aparte honoris Pastron Marceli Godlewski, de la Paroĥo de Ĉiuj Sanktuloj en Placo Grzybowski, kiu estis inter tiuj kiuj, je granda persona risko, ŝirmis la varsoviajn judojn, inter ili Ludovikon.

La 9-an de oktobro, 2019, Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof mortis, post longa vivo en kiu li laboris por la spirito de toleremo kaj en kiu li restis fidela al la ideo de paco kaj kompreno kiu troviĝas ene de la lingvo kreita de lia avo kaj kiu estas partoprenata de la centoj da miloj, eĉ milionoj, kiuj, same kiel Zaleski-Zamenhof, parolas Esperanton, la lingvon de paco.

Universala Esperanto-Asocio funebras la lastatempan forpason de la nepo de la fondinto de Esperanto kaj memoras la milojn da parolantoj de Esperanto, laborantoj por la paco, kiuj mortis per la manoj de la Nazioj.

En tiu ĉi Tago, ni memoru la pasintecon kun instruo por la estonteco, ke neniam plu homoj estu persekutataj pro sia religia, genta aŭ kultura aparteno, kaj la homaro atente respektu la homajn rajtojn je libereco, interalie de kredo kaj lingvo.

Ni neniam forgesu.

Humphrey Tonkin
Representative of the Universal Esperanto Association to the United Nations
Reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio al Unuiĝintaj Nacioj